



Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

N-ro 9/10
1965

ORGANO DE NORVEGA ESPERANTISTA LIGO
ĈEFREDAKTORO: JOHAN HAMMOND ROSBACH

3-a periodo
31-a (37-a) jaro
Monata

430 eŭropaj fervojistaj esperantistoj en Hamar -

«Denove ŝvebas inter ni mistero
la frata, la kongresa atmosfero...»



La inaŭguro de la Esperanto-strato en Elverum

Tiujn vortojn ni aŭdis en la prologo dum la solena inaŭguro de la 17-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto Federacio en Hamar, dimanĉe la 23an de majo 1965.

Neniuj aliaj vortoj povas pli precize esprimi la karakteron de la kunestado inter la fervojistoj, en belega printempa vetero, en la Hedemarka ĉefurbo.

La florornamita Teatro — Festiviteten — estis plena ĝis lasta seĝo, kiam la kongreso inaŭguriĝis dimanĉmatene.

Post kiam granda orĥestro ludis Salutmarŝon el «Sigurd Jorsalfar» de Edvard Grieg, sekvis mallonga salutparolado de la prezidanto de LKK, Per Johan Krogstie, kaj Fervoja Inspektoro Per Engen legis prologon, verkitan de Erling Anker Haŭgen.

La distriktestro de Hamar Fervojdistrikto, Sv. Sættersdal,

kore salutis la kongreson, kaj jen sekvas iom de lia parolado: «Kun granda intereso mi informiĝis pri la verkaĵo de D.ro Zamenhof, kiu ne nur estas nova lingvo, sed en la unua vico ĝi estas nova spirito inter la homaro».

Grandega aplaŭdo sekvis tiun paroladon, kiun la distriktestro faris en Esperanto.

Cetere neniu parolado fariĝis naci-lingve, sed nur Esperante, ĉar LKK en abunda tempo antaŭ la kongreso turnis sin al la diversaj neesperantistaj parolantoj kun propono pri ekzercado de iliaj tekstoj en Esperanto, kaj tio tre bone sukcesis; oni ne faris temporabajn tradukaĵojn.

La urbestro de Hamar, s.ro Erling Aūdensen, substrekis la grandan signifon de Esperanto kiel paca ligilo inter la diversaj popoloj, kaj li transdonis al la prezidanto de IFEF, s.ro K.G.J. de Jong bele ornamitan martelon kun la blazono de Hamar kaj la IFEF-insigno.

En sia dankparolado, kiu ankaŭ estis la kongresmalferma parolado, s.ro de Jong diris ke la nura komuna lingvo tute ne povas garantii pacajn rilatojn en la mondo, sed eble ĝi povas forigi danĝerajn miskomprenojn. Tial UEA nun estas proponita kiel kandidato al la Nobel-premio pri paco de 72 svedaj, 60 nederlandaj kaj 28 finnaj parlamentanoj, kaj cetere de

aroj da aliaj altranguloj. — La festparoladon faris la prez. de Norvega Esperantista Ligo, lektoro C. Støp-Bowitz.

Poste sekvis mallongaj paroladoj de la prezidantoj de fervojistaj sindikatoj kaj de la diversaj organizaĵoj de fervojistoj. Estas rimarkinde, ke la sindikatoj ek de la fondigado de la fervojista Esperantomovado, multe subtenis tiun laboron.

Dum la inaŭguro ludis la orĥestro «Esperantomarŝon» de Menzel, kaj «Purpose» de Nordraak, kaj sekvis la salutparoladoj de landaj reprezentantoj, entute de 18 diversaj landoj.

En la nomo de UEA salutis s.ro Ludvig Anjer, de SAT s.ro Georg Syversen portis saluton, de Internacia Katolika Unuigo Esperantista salutis Patro Wannemakers, kaj de Kristana Esperantista Ligo Internacia salutparolis pastoro Hans Amund Rosbach.

Sekvis fine la komuna kantado de «La Espero», kaj la komuna fotografado okazis en la parko antaŭ la kongresejo.

Diservoj kaj serioza koncerto en la Katedralo de Hamar.

Antaŭ la solena kongresinaŭguro okazis diservoj en Esperanto, por la katolikoj en St. Torfinn preĝejo, kie Patro Wannemakers celebris la Sanktan Meson kaj predikis Esperantling-
(daŭr. p. 103)

KARAJ GESAMIDEANOJ!

Kiam temas pri ĉiuj specaj formoj de vivasekuro, familia rento, aŭ pensio, turnu vin al ni.

Kun amikaj salutoj

LIVSFORSIKRINGSSKAPET
SPARETRYGDEN A/S

Reprezentanto en Esperantujo: PER JOHAN KROGSTIE, Løten

Norvega Esperantisto

ESPERANTOBLADET

Redakcio: Johan Hammond Rosbach,
Hans Amund Rosbach

Adreso de redakcio: Boks 942, Oslo
Abonprezo: En Norvegujo kaj eksterlando: n. kr. 8,—

Anonprezoj: 1/1 paĝo kr. 150,—

1/2 p. kr. 75,—, 1/4 p. kr. 38,—

1/8 p. kr. 19,—.

La Internacia Jaro

La Internacia Jaro baldaŭ finiĝos. UEA — tio estas ankaŭ vi — kunlaboras kun UNO. Kaj ni kolektas subskribojn. Faru la lastan fortostreĉon nun antaŭ Kristnasko!

La redakcio kaj la ekspedejo deziras al ĉiuj bonan Kristnaskon!

KOREKTOJ

En Norvega Esperantisto n.ro 7/1965 la preserara koboldo sufiĉe vigle petolis. Jen mi korektas nur la sencoragarigajn aferojn:

En Sciigoj de NEL, Raporto de la Liga Estraro pri la 2a jarkvarono, elfalis 2 linioj en la mezo de la alineo. Bonvolu legi jene: La 2a Nordlanda Esperanto-Kongreso okazis en Oslo, kaj la landa kunveno de NEL okazis dum la kongreso. Oni diskutis la aŭtunan laboron. NEL reprezentigis en la ĝenerala kunveno de Eldonejo Esperanto per 243 voĉoj.

En la fino de la raporto pri la Nordlanda Kongreso, p. 78, elfalis inter la novaj ordenanoj de Pro Merito, Kavaliroj de la 2a klaso, la nomo de Kjell Gustavsen.

En la gratuloj, paĝo 85, Rolf Holm fariĝis bankisto anstataŭ bakisto.

Sciigoj de N.E.L.

Kursoj. Jam estas tempo plani la kursojn dum la venonta printempa sezono. Klubo, kiu ne aranĝis kursojn dum la ĵus pasinta aŭtuno, devas nepre aranĝi almenaŭ unu kurson dum la printempo. — Sen kursoj neniuj progresoj. Kaj ĉiuj kluboj devas progresi!

Korespondaj kursoj. Notu bone ke membro, kiu varbis kursanon por la koresponda kurso (parto I aŭ ambaŭ partoj kune), rajtas depreni varbpremion de kr. 5,00 kiam li sendas la mendon. Prezoj: Parto I: kr. 23,00; parto II: kr. 25,00; ambaŭ partoj kune: kr. 42,00. Por ano de studrondo de minimume 5 anoj la prezoj estas: kr. 17,00, kr. 19,00, kr. 32,00.

Prelegoj. Se vi faras prelegon pri Esperanto, bonvolu nepre sendi raporton al NEL. Blanketojn por tiaj raportoj ni sendas je peto.

La kotizoj por 1966. Bonvolu atenti ke la landa kunveno 1965 decidis iomete altigi («rondigi») la kotizajn sumojn por ordinara membroj. Por 1966 do la rektaj membroj pagos kr. 20,00 (anstataŭ kr. 18,00), kaj kluboj pagos por la ordinara membroj po kr. 15,00 (anstataŭ kr. 13,00). La kotizoj por la ceteraj kategorioj restas senŝanĝaj.

Taskotabelo por la kluboj. — Decembro: la estraro ripetas la admonon al la membroj pagi kotizon por la venonta jaro, kaj la kasisto daŭrigas la enkasigadon de tiuj kotizoj. La Delegito de UEA daŭrigas la kolektadon de UEA-kotizoj por la venonta jaro

kaj la varbadon de novaj Individuaj Membroj de UEA. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato kaj komencas plani la printempan laboron de la klubo.

Januaro: La sekretario ellaboras la jarraporton pri la pasinta jaro. La kasisto fermas la kontojn kaj ellaboras kalkulraporton kaj bilancon. La revizoroj kontrolas ke la kasisto faras tion, kaj postulas la kontlibrojn por revizio. Estrarkunveno planas la kunvenojn de la venonta monato, kaj ĝenerale la printempan agadon, kaj pritraktas la jarraporton, kalkulraporton kaj bilancon, multobligas ilin kaj sendas kun skriba kunvoko pri ĝenerala kunveno al ĉiuj klubanoj. Tuj post la ĝenerala kunveno la sekretario sendas raporton pri ĝi (blankedo A 9) al NEL kaj al la Distrikto. Antaŭ la 15a la sekretario sendas raporton pri la 4a jarkvarono kaj studraporton pri la 2a jarduono de la pasinta jaro (bl. A 10/E 1) al NEL kaj al la Distrikto. La komisiito de la Eldonejo sendas raporton kaj pagon por venditaj libroj al la Eldonejo. La raportanto sendas raporton pri la klubkunvenoj al Norvega Esperantisto. La kasisto rekte petas la kotizojn de la nepagintaj membroj kaj sendas kotizojn kaj liston al NEL kaj al la Distrikto.

Ida 80-jara

Ida Christensen, kiun bone konas kaj alte taksas ĉiuj partoprenintoj en la Internaciaj Kursoj en Helsingør, estis 80-jara la 5-an de novembro. Eĉ pli multaj konas ŝin kiel Adi — aŭtorinon de «La forto de l' vero». Postfeste nian koran gratulon!

La subskribkampanjo

La subskribkampanjo por U.N.O. finiĝos je la fino de Decembro 1965. Ankoraŭ dum la Kristnaskaj familiaj kaj amikaj kunvenoj vi do povos kolekti kelkajn subskribojn!

Sed nun ni devas peti al ĉiuj membroj ke en la lastaj tagoj de decembro ili bonvolu sendi al ni siajn lastajn listojn kun subskriboj. Se iuj el viaj listoj portas nur unu aŭ kelkajn subskribojn, tamen sendu ilin ĝustatempe. Ĉiu subskribo estas grava kontribuo al la laboro por Esperanto!

La Liga Estraro.

Magnus Tveit mortis

Lokomotivmajstro Magnus Henning Tveit, Trondheim, mortis la 11an de oktobro 1965. Li naskiĝis en Holmedal, Sunnfjord, la 17an de julio 1899, plenumis la ekzamenon ĉe Bergen teknika lernejo 1921 kaj tuj dungigis ĉe Norvega Ŝtata Fervojo, unue en distrikto Oslo. En 1930 li venis al Hamar, kie li esperantistiĝis en 1931 pere de kurso, kiun Ottmar Fischer gvidis. Ekde la komenco en Hamar ĝis lia tro frua forpaso, Tveit estis unu el la plej fervoraj fortoj en la esperantomovado en nia lando. En Hamar li estis prez. de «La Norda Stelo» 1936—39 kaj Del. de IEL 1946—1947. En 1947 Tveit transloĝigis al Trondheim kaj elektiĝis vicprez. de «Grupo Esperantista» 1948—49, 1955—57 kaj prez. 1951—53. De 1948 li estis instruisto ĉe la leterkurso de NEL, kaj en 1949 li estis kunfondinto de Norvega Esperanta Fervojista Asocio (NEFA), kies peranto li estis por Trondheim ekde la fondo. En 1951 Tveit fariĝis Kavaliro de la 1a klaso de PRO MERITO.

Tveit havis multajn geamikojn enlande kaj eksterlande, kaj li estos karmemore funebrata.

Ripozu li en paco!

LKH

Neoficiala kongresraporto - 50-a U.K. en Tokio 1965

(Mel.: «Hønsfætter og gulerøtter»)

Ses norvegoj kaj kelkaj danoj kaj svedoj iris per RESO al Tokio por partopreni en la 50a kongreso. Tra Stokholmo kaj Helsinki ni aere al Moskvo iris. Niajn valizojn la rusoj transporti al la flughaven' ne deziris.

Siberion la rusoj kovris per nuboj, eble simbole; fotografi la nubojn oni eĉ malpermesis petole! Sed Ĥabarovsk, varmega, ŝajnis al ni ne tre siberia, kaj ni rajtis eĉ fotografi knabinojn sur bordo ĝia!

Jen Tokio, varmeg' humida, sed homoj ege afablaj. Konstruaĵoj malvarmigataj kaj ĝenerale agrablaj. Ridetantaj kaj tre puremaj ja estis ĉiuj japanoj. Ili ĉiam nur deziregis babilo kun alilandanoj.

Ĉar Lapenna ne volas flugi ja Holmes denove prezidis. Ĉu do sian vicprezidanton la ĉefestraro ne fidis? Kelkaj orientanoj de politiko sin ne detenis. Evidente do ili la neŭtralecon ne plene komprenis. ,

Sed cetere perfekta estis ja preskaŭ ĉiu detalo. Eĉ pri la participoj oni diskutis jam sen batalo! Nur la poŝto ja iom fuŝis pri la poŝtstampo kongresa, kiu por eŭropanoj estus aparte tre interesa.

Ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A jam tre degeneris. Ne mirige ke la plimulto aliajn okupojn preferis. Iuj serĉis kunvenojn, aliaj serĉadis kongresfianĉinojn. Estas tro malfacila fari el tio bonajn kombinojn!

Johansson, nia sveda Tommy, apartan strofon meritas. Por knabino aŭ por babilo jen ĉiun kaj ĉion li spitas.. Li aĉetis donacon por sia ĉefa kongresamikino, sed eraris, ho ve, kaj ĝin donis al tute alia knabino!

Evidente japanoj timis nin logi per nokta eksceso: la bankedo kaj eĉ la bal' distingigis per frua ĉeso. I.S.U. donis tre multflankajn natursciencajn prelegojn, kaj la ĉambro enhavis tiam eĉ preskaŭ ĉiujn norvegojn!

Nikko havas artaĵojn belajn kaj vere tre multkolorajn, ni admiris pordegojn, templojn, statuojn, figurojn orajn. Tamen tio ne estas tipa por la japana kulturo, efektive pli tipa estas modesta arĥitekturo.

Estas tre kurioza fakto ke ne ekzistas adresoj. La taksioj hazardis laŭ mapdesegnoj dube sukcesaj, tra urbega trafiko ŝajne eĉ sen reguloj trafikaj. Tio certe ne estus ebla sen bremsoj vere unikaj!

Postkongreso en Kjoto, Nara, jen sperto plej interesa; sed en Kjoto neniu rajtis malsati post la sesa! Tiam Lewin kandidatiĝis por la vivsava medalo, ĉar li trovis manĝejon en la Kjota strateta ĝangalo.

Multon strangan ni manĝis, ofte uzante lerte haŝiojn: gastropodojn en soja saŭco, kaj algojn kaj holoturiojn, krudajn fiŝojn kaj nigrajn ovojn kuŝintajn jardeke en tero, verdan teon ni trinkis kune kun tutmoderna biero.

Fino venis, ni enŝipiĝis kun kofroj plenaj de vodko kaj kimonoj, kameroj kaj tiel plu sur voj' al Naĥodko. Bedaŭrinde perdiĝis unu valizo en Sovjetio, sed cetere belega sperto estis nepre ĉio.

C. S.-B.



**51-a
Universala
Kongreso de
Esperanto
Budapest 1966**

KOTIZOJ

La aliĝkotoj validaj ĝis la 31a de decembro 1965 estas jenaj:

	gld.	ft.
Kongresano	55,—	360
Edz(in)o	27,50	180
Junulo malpli ol 20-jara..	21,—	140
Universitata Studento	34,—	225
Blindulo	27,50	180

La kotizo kaj la aliĝilo devas esti senditaj samtempe al la sama instanco. Aliĝiloj, pagitaj laŭ la supremenciita kotiztabelo, kiuj atingos la adresojn de la Kongreso aŭ de la Kongresaj Perantoj post la 31a de decembro, ne estos traktitaj.

UNUA BULTENO

La 8-paĝa Unua Bulteno kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la Landaj Asocioj kaj Ĉefdelegitoj de UEA, ĉe la Kongresaj Perantoj kaj ĉe la konstanta adreso de la Kongreso.

GLUMARKO

Estas aĉetebla ĉe la Libro-Servoj de la landaj Asocioj kaj de UEA bela kolora glumarko eldonita okaze de la 51-a Universala Kongreso de Esperanto. Prezo: 0,40 ned.gld. (1,60 st.) por 10-glumarka folio.

FOTO-KONKURSO

En la kadro de la 51-a U.K. okazos la 5-a Internacia Foto-Konkurso. — Temo: «Infanoj ne konas limojn». Oni rajtas partopreni en la Konkurso per nigreblankaj fotoj (nelimigita kvanto) kaj per diapozitivaj (maks. 5). Pliaj detaloj kaj informoj pri la premioj en venontaj komunikoj.

STATISTIKO

(ĝis 4/10 1965). Arg. 1, Aŭstralio 1, Belg. 5, Braz. 2, Brit. 12, Bulg. 6, Danl. 3, Finnl. 2, Franc. 21, Germ. Fed. Resp. 7, Hisp. 2, Hongkongo 1, Hung. 16, Israelo 2, Italujo 5, Jap. 8, Jug. 7, Monako 2, Ned. 11, Norv. 2, Nov-Zel. 1, Poll. 4, Sved. 8, Svis. 2, U.A.R. 1, U.S.A. 8. — Entute 142 el 27 landoj.

G. G. Pompilio
Konstanta Kongresa Sekretario

430 eŭropaj fervojistaj esperantistoj en Hamar



Per Johan Krogstie salutas la kongreson dum la solena inaŭguro

(daŭr. de p. 98)

ve por la la unua fojo post la grava decido dum la Dua Vatikankoncilo. Samtempe okazis en la belega katedralo la protestanta diservo, gvidata de pastoro Hans Amund Rosbach. La en-kaj elirpreĝojn legis en Esperanto pastoro Erling Schau, Løten.

La lasta programero de la kongreso ankaŭ okazis en la katedralo dum la vespero de la Ĉielirtago, jaŭde la 27-an de majo. Tiam okazis koncerto, kie partoprenis katedralorgenisto Ragnar Røgeberg, la violonisto Rolf Nomerstad, Løten, la miksitaj ĥoro de Hamar instruistlernejo, kaj la virĥoro Løiten Sangforening. Ambaŭ ĥoroj kantis norvegajn himnojn, kun tekstoj tradukitaj al Esperanto. La koncerto estis ege bona, kaj ĝi rikoltis multe da laŭdo en la loka gazetaro.

La Norvega Fervojmuzeo.

Nun ni reiru al dimanĉo la 23an de majo, kiam posttagmeze okazis vizito

al la plej malnova, kaj la plej granda fervojmuzeo en tuta Skandinavio.

En tiu muzeo oni ne nur povas rigardi antikvajn lokomotivojn, vagonojn kaj diversajn ekipaĵojn, sed en la 30 000 m² granda areo estas trakanĝaĵoj kaj malnovaj stacidomoj, kie la iamaj estroj rigardas al la vizitanatro el siaj portretoj laŭ la muroj. En iu stacidomo oni eĉ trovas staciestran loĝajon kiel ĝi estis dum la 1890-jaroj.

La fervojfakuloj dum tiu vizito vigle studis la unuan traktipon de Norvegujo, faritan de la angla Brunell-tipo, kaj malnovan barilon, kiu alterne baras la trakon, aŭ la landstraton, laŭbezone. Kun intereso la gevizitantoj studis la diversajn veturilojn en la vagon- kaj lokomotivhalo, de la malgranda etŝpura lokomotivo «Alf», iam en trafiko laŭ la Rørosfervojo, la famekonata «Caroline», la fierajn reĝvagonojn de Carl 15. kaj la Oscar-oj, kaj tiun de Haakon 7., — ĝis la

giganto: «La Dovrepatro». — La plimulto ankaŭ faris vojaĝon per la trajno de la Aurskog-Hølandfervojo, kiu trafikis en la muzeareo, en longeco de 750 m.

La junulara sekcio de IFEF aranĝis propran programon.

La junularo inter la francaj kongresanoj transprenis la aranĝadon de speciala programo, vespere post la vizito en la Fervojmuzeo.

Ili montris filmon pri internacia skisemajno, kiun ili aranĝis en la aŭstraj alpoj, kun gepartoprenantoj de Germanujo, Aŭstrujo, Danlando kaj Italujo.

Cetere ili kantis, ludis teatraĵojn, kaj montris, ke oni per modestaj metodoj kaj propraj fortoj povas distri kaj ĝojigi aliajn.

Novaj statutoj, nova landa sekcio.

Lunde la 24an de majo okazis la unua el la 4 laborkunsidoj en la kunvenejo de Vangs Sparebank. Dum la laborkunsidoj oni pridiskutis temojn por fakprelegoj, fakvortaroj k.t.p.

La tagordo kaj la proponoj estis vastaj, sed post la lasta laborkunveno dum Ĉielirtago, ĉio estis preta. Plej ĝojige estas, ke la ĉefaj kolegoj nun havas eblecon aliĝi al IFEF, kun siaj 60 anoj.

La multjara ĝeneralsekretario de IFEF, Jan Lok, Amsterdam, fariĝis

honora membro, kaj li ricevis la novan insignon en oro. Menciinda estas cetere ke 7 eŭropaj fervojadministraciacij nun donas klarigan tekston al la internaciaj signoj ankaŭ en Esperanto, en la fervojaj horaroj, jen la fervojoj: La bulgara, la dana, la germana, la jugoslavia, la pola, la hispana kaj la hungara.

Kiel kongresloko por la jaro 1966 elektiĝis Utrecht, kaj por 1967 la germana urbo Fulda.

Fakprelego kaj internacia balo.

Kiel temon por la fakprelego, trafikinspektoro Per Engen elektis la novan tarifsistemon por La Norvegaj Ŝtataj Fervojoj, enkondukitan ek de la 1a de januaro 1965. — Poste okazis bankedo kaj internacia balo.

La kultura kaj teatra vespero.

Oni deziris montri al la gekongresanoj tipe norvegan kulturprogramon en Esperanto. La sama orĥestro, kiu ludis dum la solena kongresinaŭguro, sub gvidado de Rolf Nomerstad, ludis komence polonezon de Johan Svendsen. — Sekvis popoldancprogramo de gedancista grupo de Østerdalslaget en Hamar, laŭ violonmuziko de la kampara muzikisto Jon Røe, Vingelen.

S.ro Halvdan Karterud recitis la tre dramatan poemon «Bergliot» de Bjørnstjerne Bjørnsson, dum s.ino Wenche Sveen el Løten akompanis

TELEFONO:
L Ø T E N 39

KILDE GJESTGIVERI
KILDE GASTEJO

Proksime de Løten stacidomo — Mezvoje inter Hamar kaj Elverum
Modernaj ĉambroj — Hejtigitaj aŭtogaraĝoj
Ideala loko por kursoj kaj festoj de esperantistoj

LA HOTELO POR VI!



«Bonvenon» ĉe la pordego de la stacidomo en Hamar

per piano. Ankaŭ fragmenton de Peer Gynt de Henrik Ibsen la gekongresanoj vidis, la geaktorj Astri Jacobsen kaj Stein Winge ludis «La morton de patrino Aase», kaj parto de la orĥestro dume ludis la muzikon al tiu fragmento, verkitan de Edv. Grieg.

La orĥestro donis novan parton da norvega muziko, antaŭ ol la gedancista grupo finis la programon.

La ekskursoj.

Dum la kongreso okazis tri ekskursoj, el kiuj la vizito al Elverum estis la plej interesa, ĉar tie oni solene inaŭguris la unue deciditan Esperantostaton en Norvegujo.

Al tiu ekskurso, la Norvegaj Ŝtataj Fervojoj tre afable disponigis trajnon, kie la granda vaporlokomotivo estis bele ornamita per du Esperantoflagoj kaj la insigno de IFEF ĉe la fronto. La vagonoj estis la plej belaj

kaj modernaj de NSB. En la ekskurso partoprenis la Fervojista Blovorĥestro de Hamar, kaj en procesio kun la muzikistaro ĉe la pinto, la gekongresanoj marŝis al la Esperantostato, kiu situas tute apud Terningmoen, paralele al Renaveien. Antaŭ la inaŭguro oni kantis unu version de «La Espero» sub gvidado de la orĥestro.

La parolado de la urbestro, s.ro Markvard Bækken, okazis norveglingve, kaj s.ro Rolf Bugge-Paulsen tradukis al Esperanto. Pro la multaj neesperantistoj kolektitaj, ankaŭ la prezidanto de LKK kaj de NEFA, Per Johan Krogstie, parolis norveglingve, kaj trafikinspektoro Per Engen tradukis al Esperanto. Je la fino de sia parolado Krogstie dankis al la komunuma estraro pro la iniciato, kaj deklaris la straton malfermita. La urbestro kaj la LKK-prezidanto komune malkovris la stratnomŝildojn. Fine la

muzikistaro ludis unu version de la norvega nacia himno, kaj ĉiu povis ĝin kanti, ĉar ĝia esperantlingva traduko troviĝas en la kongreslibro.

Poste oni vizitis la regionan popolmuzeon, Glåmdalsmuseet, kaj la muzeon por arbarkultivado.

En la belega vetero oni ĝuis neforgeseblan vesperon en Elverum.

La dua ekskurso okazis per la pramo «Mjøsfergen» al la najbarurbo Gjøvik. La vetero estis belega, la pramo tre bele ornamita per signalflagetoj, kaj ankaŭ per la Esperantoflago.

En Gjøvik lektoro Helseth aranĝis kunvenon en la parko de Gjøvik gård, kie li vigle rakontis pri la historio de la urbo ĉe la okcidenta bordo de lago Mjøsa.

La lasta ekskurso iris al Lillehammer. Ĝi estis tuttaga kaj okazis per aŭtobuskaravano.

Oni haltis apud la mezepoka preĝejo en Ringsaker, kie paroĥestro Lange rakontis pri ĝia historio, precipe pri la tre grandioza, unika altarŝranko. Poste la karavano veturis al la popolmuzeo Maihaugen, kie oni rigardis la vidindaĵojn. Menciinde estas, ke la ŝtatervoja administracio helpis al eldonado de esperantlingva gvidlibreto eĉ kun ilustraĵoj pri la muzeo. Kaj fruvespere oni kolektiĝis en la liberaera teatro de la muzeo, kie la 17a kongreso de IFEF solene fermiĝis.

Dum la reveturado al Hamar oni veturis tra la montarregiono Sjusjøen, kaj dum la vizito kaj halto tie la gepartoprenantoj spertis, ke Norvegujo estas la lando de grandaj kontrastoj. Ili venis de bela somero en la Mjøsa-regiono, en la altmontaron, kie ili finis la kongreson per tre bonhumora neĝpilk milito kontraŭ «ruĝrusoj» de la gimnazio en Lillehammer.

Post la kongreso kelkaj gekongresanoj povis fari vojaĝojn al Okcident-Norvegujo, laŭ du alternativoj, en la reĝisorado de la vojaĝoficejo de NSB.

RECENZOJ

«Esperanto, moderna lingvo»

Sub tiu ĉi titolo aperis libro en la eldonejo «Fondumo Esperanto», Helsinki. La libro kostas naŭ kronojn, kaj ĝi enhavas tri studojn pri Esperanto. Sur 136 paĝoj da mezkvalita papero la akademia triopo Vilho Setälä, Ebbe Vilborg kaj C. Støp-Bowitz enprofundiĝas en la problemon de la pasivaj participoj en Esperanto.

Setälä en sia artikolo «Bazaj principoj de Esperanto kiel internacia lingvo» komence konstatas, ke ĉiu lingvo havas sian propran logikon, kaj ke la logikeco de Esperanto konsistas en tio, ke ĝi estas konsekvenca al sia propra logiko. Tiu konsekveneco manifestiĝu en plej vasta uzado de analogioj, do ankaŭ analogia transformo de aktiva kompleksa verboformo en pasivon. Interesa estas lia komparo de la esperanta participa sistemo kun tiu de la finna lingvo. Ĝi montras, ke la finna lingvo, kiu ne estas hindo-eŭropa, esprimas nur tempajn indikojn per la participoj. La aspekton ĝi esprimas ĉe transitivaj verboj per la kazo, en kiu staras la objekto en aktiva frazo, la subjekto en pasiva.

La studo de Vilborg titoliĝas «Memuaro pri la esperanta pasivo». Li konstatas, ke en la hindo-eŭropaj lingvoj la pasivo estas parte «pasivo de esto» esprimanta staton, parte «pasivo de iĝo» esprimanta transformon de unu stato al alia. La helpverbo de la esperanta pasivo estas stata, do estas malfacile esprimi la pasivon de iĝo en Esperanto. Poste Vilborg pristudas la diversajn provojn solvi tiun problemon.

La studo de Støp-Bowitz, kiu okupas la duonon de la libro, titoliĝas «Esperanto, lingvo de moderna tipo».

Lia elirpunkto estas historia super-rigardo pri la hindo-eŭropaj lingvoj, surbaze de kiu li distingas inter lingvoj de antikva kaj lingvoj de moderna tipo. Grandan spacon en lia verko okupas pristudo pri la funkcioj de la verbo.

Ĉiuj tri studoj pritraktas la manierojn esprimi diversajn aspektojn en Esperanto. Vilborg kaj Støp-Bowitz krome donas ampleksan prezenton de la aspekta sistemo (itismo) kaj la tempa sistemo (atismo), laŭ kiuj oni uzas la kompleksajn pasivajn verboformojn. Tiun prezenton Støp-Bowitz ankaŭ donas per tre ilustra diagramo. Ĉiuj tri aŭtoroj montras, ke ĉiuj participoj troviĝantaj en la Fundamento de Esperanto estas interpreteblaj laŭ la tempa sistemo. Do la atismo ne estas kontraŭfundamenta. En la cetera verkaro de Zamenhof Vilborg konstataŝ ŝanceliĝon en la uzado de la pasivaj participoj, kaj li trovis nur tre malmultajn ekzemplojn pri uzmaniero, kiu ne konformas kun la tempa sistemo. La fakto, ke Zamenhof en siaj unuaj projektoj konservis elementon de aspektesprimado en la konjugacio, sed poste forĵetis ĝin, supozigas, ke li ne intence donis al la pasivaj participoj nuancon de aspekto. Li ankaŭ ne mencias aspektojn en la Fundamenta Gramatiko. Esprimado de aspektoj per konjugaciaj rimedoj estas trajto de lingvoj de antikva tipo, do la atisma koncepto ankaŭ konformas kun la cetera strukturo de Esperanto.

En kelkaj lingvoj, precipe la slavaj, la aspektoj ludas tiom gravan rolon, ke estas malfacile liberigi sin de aspekta pensmaniero, eĉ kiam oni uzas Esperanton. En tiuj lingvoj ne tiom gravas, ĉu unu ago estas antaŭa, samtempa aŭ posta rilate al alia ago. Pli gravas, ĉu ago estas daŭra, momenta, ripeta ktp., kaj ĉu ĝi donis rezulton. Ilustran ekzemplon pri tia

pensmaniero Støp-Bowitz trovis en raporto de la estraro de VEA, verkita de profesoro Lapenna. Tie estas skribite, ke la estraro finis certan nombron da punktoj, dum ekzemple ĝermano skribus, ke ĝi pritraktis certan nombron da punktoj. Por slavo gravas, ke la pritraktado venis al fino, do donis rezulton, dum ĝermano celas prezenti, KIO OKAZIS DUM LA KUNVENO. Kiam mi legis tion ĉi, mi tuj rekonis la problemon. Kiel studento de la rusa lingvo mi klopodadas enpenetri en la aspektan pensmanieron, kaj ofte estas preskaŭ neeble al mi decidi, ĉu la rezulto de ago gravas pli ol la ago mem. Por ano de aspekthava lingvo ne estas same malfacile konstati la pure tempajn rilaton inter diversaj agoj. Tial mi trovas prava la opinion de la aŭtoroj de tiu ĉi libro, ke la tempa sistemo prezentas la pli grandajn avantaĝojn.

La konkludoj de la tri akademianoj eble surprizos kelkajn. Ili ne postulas monopolon de la tempa sistemo, sed ili pledas, ke ambaŭ sistemoj estas egale traktataj kaj ke oni scienca pristudu la problemon. Tio estas klara esprimo de la tolerema, sobre scienca sinteno, kun kiu la tri akademianoj pritraktis ĉi tiun tiklegan demandon. Profesoro Collinson prave diras en sia antaŭparolo al la libro: «Super ĉio mi estas feliĉa ke ĉi tiu prezentado estas senpasia kaj objektiva — ĝi celas nek vundi nek ridindigi.» Eble mi kuraĝu aldoni, ke la pli frue aperintaj libroj pri tiu ĉi temo, eĉ se ili pretendas esti sciencaj, suferas mirindan mankon de tia objektiveco.

Recenzo tradicie devas havi almenaŭ unu kritikan rimarkigon, kaj mi ne rompu la tradicion. Laŭ mi precipe la memuaro de Vilborg havas tro multajn notojn, kio iom komplikigas la legadon. Oni ankaŭ atentu, ke se io estas malfacile komprenebla, la kaŭzo estas preseraro, kaj oni devas

iom tro ofte konsulti la liston de preseraroj. Sed krom la preseraroj la libroj enhavas tiom klarajn prezentojn de la problemo, ke oni ne bezonas esti sciencisto por ĝin kompreni. Resume mi do rekomendas al ĉiuj havigi al si la libron.

Otto Prytz

Du Martinus

Ib Schleicher: Objektiva vivkoncepto. 26-paĝa kajero, multe ilustr. Eldono de Martinus-Instituto 1963.

En tiu ĉi kajero inĝeniero Schleicher provas prezenti la danan pensulon Martinus kaj liajn ideojn en tiel populara formo, ke oni ricevu emon iom pli scii. Ĉu li en tio sukcesas, mi ne scias, ĉar mi jam legis la Martinus-librojn kiuj aperis en Esperanto, kaj tial jam havas tiun ĝeneralan scion al kiu Schleicher volas gvidi. Sed, kiam li diras, ke ni ne rajtas juĝi sen propra esploro, nur laŭ ĝeneralaj onidiroj, li absolute pravas. Ni ankaŭ ne rajtas forĵeti la pensojn de Martinus, dirante ke ili estas fantaziaĵo, sen kono de tiuj pensoj.

Tamen, en unu grava punkto mi devas demandi, ĉu ne kaj Schleicher, kaj Martinus, mem tiel agas: Kiam temas pri la kristanismo, mi ĝis nun neniam vidis, ke ili konsideras la kristanajn pensojn laŭ kristana vidpunkto. En la kajero paĝo 6, s-ro Schleicher diras pri Dio:

«Se li ne povas forigi la erarojn, li ne estas ĉiopotenca.

Se li ne anticipa sciis pri la eraroj, li ne povas esti ĉioscia.

Se li ne volas forigi la erarojn, li ne estas ĉioama.

Laŭ mia kompreno ĉi tiu argumentado, kiun oni cetere povas trovi ankaŭ aliloke, estas absolute nerefutebla.»

Ĉu? Prave, oni ofte aŭdas ĉi tiun argumentadon. Sed kial s-ro Schlei-

cher ne demandas, serĉas kaj trovas kion kristanismo diras pri tio. Kaj kial li ne faras aldonan demandon, kiu eble donas parton de la respondo:

«Se ni, la homoj, ne sufiĉe komprenas kio estas eraro, kio estas amo, kiaj estas Diaj planoj, tio estas la kaŭzo, ke ni ne laŭ nia povra logiko povas akcepti la veron.»

HAR

*

Martinus: La sorto de la homaro. 112-paĝa bindita libro kun ora surpreso. Eld. Martinus-instituto 1964.

Per 47 ĉapitroj la dana pensulo volas montri la homaran evoluon ĝis pli altaj ŝtupoj, konsiderante kion ni jam nun havas kaj atingis. La libro estas facile legebla, la lingvaĵo estas polurita kaj glata, la logiko ŝajne nerefutebla. Tamen li kelkloke, post iom longa argumentado pri iu evidenta punkto je kiu neniu povas aŭ volas kontraŭdiri, enkondukas tute novan ideon en mallonga frazo, kaj pluen argumentas sen atenti la eble dubindan «veron» kiun li tiel enkondukis. La saman manieron oni ofte trovas en sekterismaj kristanaj libroj, en kiuj svarmas bibliaj citaĵoj je komune akceptataj nocioj, sed la novaj pensoj estas enkondukataj en eta frazo. Ekzemplon ni trovas en ĉap 16, kie tute nova ideo enkondukiĝas per tiu frazo:

«Ĉar neniu ajn energio povas iri laŭ rekta linio, sed estas devigita movi sin en cirklo, do...» Tiu ideo do estu ĝenerale akceptata?

Alieloke mi devis skribi grandajn demandasignojn en la marĝeno (8-a ĉap):

«La nereligiuloj... (Ili) estas antaŭenpelataj de daŭre grandiganta bezono pri scio.»

Mi kredas, ke la spertoj de ĉiu ajn pastro en ĉiu ajn eklezio estas tute

malaj. La nereligiuloj estas absolute ne antaŭenpelataj, ili estas, plejparte, tute indiferentaj.

Martinus ofte bazas sian pensadon sur kristanaj nocioj. Strange tiam estas vidi (ĉap 29) ke, la infero — pri kiu Jesuo parolis, pri kiu la Biblio ofte parolas — estas «tra superstiĉo esprimita» tiel, kaj ke la bibliaj pensoj pri «eterna fajro» kaj «senfina perdiĝo», kiun atribuis al ĝi la primitiva fantazio, kompreneble neniel ekzistas», dum li samtempe povas paroli pri «sur sfero konata kiel la nocio la purgatorio», verŝajne sciante, ke la katolikoj havas nur tre malfortan, kaj dubindan, biblian bazon por sia purgatorio-dogmo.

Ke Martinus pledas por kredo je reenkarigiĝo, ke li asertas ke la estonta vojo de la homaro gvidos tra reiro for de la mona sistemo, al la interŝanĝo de laboro ktp., igas la libron interesa. Ĉie oni trovas ion, je kiu oni povas kapjesi aŭ nee skui la kapon. La libro do igas al pensado!

HAR

Esperanto en komerco

Nia firmo — Reper Eldonejo kaj Propagando, Rua Senador Dantas 117, Rio de Janeiro, GB, — deziras pligrandigi sian movon eksterlanden. Nia informrevua eldonado pri komerco, industrio, financo, ekonomio kaj cetero servas nun je dekmilkelkaj organizacioj krom bankoj kaj publikaj oficejoj.

Ni agnoskas kaj deziras pruvi la praktikan utilecon de nia internacia lingvo rilate al la supre menciitaj temoj.

Ni serĉas seriozajn interrespondulojn en ĉiuj landoj, kiuj kapablas doni aŭ interŝanĝi industriajn, ekonomiajn, financajn, komercajn, k. a., informojn profitigaj al niaj abonklientoj.

KATEĤISMA KANTO

Sankta Di', la Via nom' kaj gloro
super mondo brilu en honoro,
kaj en animo —
sub ŝarĝ' de timo,
de pek' kaj krimo —
kun laŭd' sen limo
en koro.

Bele, riĉe, estas tion aŭdi:
homoj sian Dion voĉe laŭdi,
kaj el profundoj,
arbaraj fundoj,
en hor', sekundoj,
al Diaj vundoj
aplaŭdi.

Kaj se homoj povus eĉ forgesi
nomon gloran de l' Sinjor' konfesi,
aŭdiĝus sono
el osto, ŝtono,
pro Lia bono
ke Dia kono
progresu.

Antaŭ Dio perdus la honoron,
la moruo laŭdus la Sinjoron —
kun ĝi baleno
kaj la delfeno
el marbaseno —
pro Dia beno
kaj gloro.

Eĉ se mond' disiĝus je nenio,
eĉ se ĉiu mortus, restus Dio!
kaj flugus miloj
inter la steloj
sur la ĉieloj
kiel anĝeloj
al Dio.

Se al Dio ter-armeo mankas,
tamen miloj ĉiam Dion flankas,
jes, mil post miloj
da Diaj filoj
kun muzikiloj
en ĉielbrilaj
Lin dankas.

Ĉar genuos ĉiu ĉe la trono, —
la anĝeloj kun la brila krono,
la hom' sur tero,
kaj el infero
— la nigra sfero
de la sufero —
demono.

Montoj, valoj, ja al malapero
kondamniĝis ĝis la lasta ero!
Post tio puna
pro ĉiu nuna
de Dio suna
kreiĝos juna
la tero.

Se olduloj dormos kaj rigidos,
fetoj en patrino sino fidos,
la blinda, lama,
la povra, fama,
la senordama
en brilo sama
lin vidos.

Dum mi serĉas pri mi mem la veron,
vidas pekan mi plej etan eron,
eĉ la similo
al la humilo
nur estas ilo
de ŝajnobrilo
sur tero.

Sed, ho homo, ĉu vi opinias,
ke vin savos Dio, se vi bias
nur en parolo,
aŭ pro titolo
de apostolo
se tian rolon
vi scias?

Ne, neniel vi per kapa gesto
donas gloron al ĉiel-majesto.
Sed ĝis la morto
en ĉiu sorto
per tuta forto
laŭ Dia vorto
vi estu.

Via lumo en la ingo staru,
en la decaj moroj ne eraru,
kaj pri honesto,
pri la modesto
en via esto
pri vi atestu
homaro.

Vi ne amu kion Di' ne amas,
ke vi ne en la volupto flamas.
Vin ne proponu
al la malbono —
vin via kono
de Di-ordono
ornamas.

Sed se vi laŭ pekaj vojoj iras,
al malvirtoj nia viv' sopiras,
la nomon Dian
kaj Regnon Lian
en koton plian
ol vivon tian
vi tiras.

Sed, ho Di', vi tion ne permesu.
La sendiaj agoj tuj nun ĉesu.
Ni el batalo
kaj el la falo
al la regalo
en Via halo
progresu.

*Laŭ «Herre Gud! dit dyre Navn og Ære»
de Petter Dass (1647—1707), norvega
pastro kaj verkisto. La jena himno portas
titolon «La patro-nia, dua kanto».*

Norvega Kroniko

Red.: Karsten Langsholt

Klubo Esperantista en Oslo.

7/10. Okaze de la 20-a datreveno la prezidanto John Berggreen proponis ke la klubo sendu gratul-leteron al UNO, dankante pro la granda laboro por la paco.

Astrid Mansrud faris prelegon pri «UNO-organizo kaj taskoj». Helpe de tabulo ŝi klarigis por ni la organizon de UNO kaj la diversajn organojn, politikajn, jurajn, teknikajn k. t. p. Precipe ŝi menciis la laboron de UNESCO kiel la plej gravan, laborante en la sekcio por kulturo, edukado kaj scienco. Por progresigi la internacian kunlaboron UNESCO kunlaboras kun multaj asocioj inter ili UEA. — La prezidanto dankis pro la tre interesa prelego.

Nia manskribita gazeto «La Vagabondo» — post longa foresto — ree aperis, redaktita de Inger Richard. La enhavo estis tre varia: spritaĵoj, anoncoj kun demonstracio, liber-tempa taglibro pri ekskurso en la montaro; ankaŭ recepto pri kukoj — specimenojn de kiuj ŝi donacis al la venonta redaktoro.

C. Støp-Bowitz (akompanata per piano de Harald Støp-Bowitz) kantis sian tradicion ne-oficialan humorplenan raporton pri la Kongreso en Tokyo [troveblan en ĉi tiu numero. Red.]. Li rikoltis fortan aplaŭdon. — Fine li montris siajn mem-faritajn fotojn (kolor-lumbildojn) prenitajn dum la vojaĝo al kaj restado en Japanio. Li ankaŭ montris kelkajn japanajojn.

18/10. Tiu ĉi kunveno estis speciala kunveno kun diskuto pri klubaj aferoj, kion fari por havigi pli da membroj kaj eble pli bonajn kaj viglajn programojn. Gunleik Bergrud faris la

enkondukon. Li komencis dirante ke li lernis esperanton por propra ĝojo, kaj li ankaŭ sentis la respondecon komuniki ĝin al aliaj kaj interesigi ilin por la internacia lingvo. Li rekomendis prelegojn en aliaj asocioj, sed la plej bona estas la persona kontakto. Ni devas havi pli bonajn kaj interesajn kursojn. La elementa kurso ne estas sufiĉa — daŭrigaj kursoj aŭ studrondoj estas nepre necesaj. Multaj lernis Esperanton, sed pliparte ili malaperis. Kial? Eble ni devas starigi komitaton por studi la problemon?

La posta diskuto estis tre vigla, kaj aro da faktoroj estis menciitaj, inter alie ĉu la programoj estus parte norveglingvaj, precipe kiam ni invitas novulojn. Ĉu oni havas iun utilon de Esperanto? Multaj spertis ke jes. Pri prelegoj en aliaj asocioj nia propagandestro Thor Magnus Carlsen diris ke tio ne estas facila tasko — li skribis al 26 kaj rezultigis 2 prelegojn.

La prez. John Berggreen dankis la preleganton kaj la debatantojn por la granda intereso montrata por la problemo. Li opiniis ke ne estas la kvalito de la programoj kiu estas la plej grava, sed la etoso dum la klubkunvenoj kaj precipe ke ni provu tiri la novulojn en nian rondon tiel ke ili sentas sin bonvenaj.

La Urso, Sarpsborg,

regule kunvenas. Al la kunvenoj estas invitataj gimnazianoj, el kiuj tri membriĝis.

En unu kunveno J. H. Rosbach faris lumbildan paroladeton, kiun li nomis «Eŭropa kalejdoskopo» — estis mozaiko da belaj vidindaĵoj.

Ascendo, Halden.

29/10 estis kunveno ĉe Evald Danielsen, kiu nin regalis per bongustaj tritikaj tranĉoj kaj buloj kun fortega kafo, kiu vigligis la interparolon.

La prezidanto legis cirkuleron de

NEL kaj memorigis pri 24. Oktobro, la tago de UNO. Poste lingva kvaronhoro. — Arnt Dahl montris belan kolorfilmon «La verda insulo de Sta. Patrick». La tekston improvize tradukis la prezidanto el la norvega esperanten. Ni havis belan enkondukon en la historion de la insulo ekde la vikinga tempo. Ni ankaŭ vidis, ke la insulo konsistas ne nur el malfekundaj torfokampoj kaj sunvipataj erikejoj, sed ankaŭ el fekundaj agroj kaj kampoj kaj, en la sudo, eĉ subtropikaj pejzaĝoj.

«La tri verdaj steloj de Løten»

post longedaŭra paŭzo denove estas aktiva. La unua kunveno aranĝiĝis en tiu aŭtuno en Kilde Gjestgiveri en Løten 12/10. — La klubanoj povis ĝoji sin, ĉar alvenis komencanto en la kluban rondon, — juna knabo kiu sekve de la impresoj de la fervojista kongreso en Hamar en majo, ekinteresiĝis pri nia afero, kaj tuj mendis la korespondkurson. La prezidanto deziris bonvenon al la kunvenintaro, kaj speciale li salutis la novan komencanton. Por enkonduki la junulon en Esperanton, la prezidanto montris bildserion pri la vivo de D.ro Zamenhof, kun posta provleciono en la lingvo. — Poste oni rigardis fotografajojn pri la fervojista kongreso en Hamar.

Post la kafpaŭzo la prez. laŭtlegis cirkuleron de NEL kaj sekve de instigo, oni membris la 20-jaran jubileon de UN per sendado de salutkarto al ĝia prezidanto U Thant.

De nun oni volas provi regule aranĝi klubkunvenon ĉiundan semajnon, por interalie ekzerci kaj refreŝigi la lingvajn sciojn.

25/10. Kunveno en la Kafejo de Kilde Gastejo en Løten. Komence la prezidanto informis pri la nuna subskribkolektado al Unuiĝintaj Nacioj. Ĉiu ĉeestanto ricevis sian skemon, kun peto pri la plej eble bona rezulto. Daŭre oni ekzercis la lingvon. La kunveno finis ĉirkaŭ la kaftablo.

Korespondu!

Deziras korespondi pri iu ajn temo s.ro Vicente Leal R., Vicolo Pozzo 1, Verona, Italujo.

50 junaj belgaj gekomencantoj dez. kor. kun genorvegoj. Skribu al s.ro Gilles Pagnoul, 11, Str. Spintay, Verriers, (Liège), Belgujo.

18-jara lernanto, komencanto, dez. kor. kaj interŝanĝi bildkartojn. S.ro Cheneia Dan, St.-Miron Costin nr. 3, Cernavodou, Dobrogea, Rumanujo.

Norsk Esperanto-Forbund (Norvega Esperantista Ligo)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.30
Kontoradrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Kontortid: Tirsdag og fredag 15.30—16.30

Turisma Servo: Boks 942, Oslo.
Postgiro 100.32

Esperantoforlaget A/S (Eldonejo Esperanto A/S)

Postadrese: Boks 942, Oslo. Postgiro 100.31
Postadrese: St. Olavsgate 27 III, Oslo
Telefon: 20 20 83

Ĉefdelegito de U.E.A.:

S-ro Alfred Skyberg, Østensjøvn. 118 a,
Oslo-Bryn. Postgiro 133.29

La redakcio:

Privata adreso de la ĉefredaktoro:
Johan Hammond Rosbach,
Hulderveien 17 B, Sarpsborg. — Uzu tiun
adreson, kiam temas pri urĝaj sendaĵoj.
Telefono: 54 7 27